

3 ☆ 1994 ☆ 160

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

## STRÁŽNICE

*atendas  
vin*



16. - 23. 7. Strážnice - 67a Kongreso de SAT

# Ĉeĥa Esperanto-Asocio 25-jara

En la tagoj 29/30-a de marto 1969 dum konstitua kongreso en Besední dům (Kulturdomo) en Brno estis refondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun sidejo en Prago, kaj kiel la unua prezidanto estis elektita Josef Vitek. Nia asocio festos la datrevenon je nacia nivelo per konferenco en Česká Třebová planata por novembro, sed ni havas eblon festi nian 25-jariĝon je internacia nivelo jam dum la 67-a SAT-kongreso, kiun nia asocio gastigas en Strážnice (16. - 23. 7. 1994).

*67-a SAT kongreso*  
Strážnice 16.-23.07.94  
palaceo 36  
CZ-696 03 STRÁŽNICE

67-a SAT  
KONGRESO  
Strážnice  
16.-23. 7.  
1994



## Strážnice

Se vi volas renkontiĝi kun amikoj, kun samideanoj el Ĉeĥio kaj eksterlando, se vi volas samtempe konatiĝi kun regiono de iama Grandmoravia Regno, kie misiis la sanktaj apostoloj Konstanteno-Cirilo kaj Metodo kaj kie 700 jarojn poste travivis sian junecon Jan Amos Komenio, se vi volas gustumi la famajn sudmoraviajn vinojn, veturu al SAT-kongreso en Strážnice.

Strážnice (= Gardejo) jam laŭ sia nomo sugestas, ke ĝi estis dum jarcentoj taskita gardi la vojojn al Hungario laŭlonge de la montetaro Blankaj Karpatoj, kiuj formas naturan landlimon. Gardoturo restis ankoraŭ kiel parto de preĝejo Sankta Marteno, konserviĝis bastionoj el la 16-a jc. kaj pordegoj al proksimaj najbaraj urbetoj Skalice kaj Veselí.

Strážnice estas urbo de famaj internaciaj folkloraj festivaloj de kantado kaj danco ĉe zimbazona muziko en kastela parko kun agrablaj promenejoj. Malantaŭ la urbo eblas viziti originalan subĉielan muzeon de popola arkitekturo aŭ tipajn sudmoraviajn vinkelojn.

## Programo de la kongreso

ne estas strikte kaj rigide starigita. Sabate kutime okazas interkonatiĝa vespero, kiun dimanĉe sekvas solena malfermo kun salutoj de unuopaj landaj reprezentantoj. En la sekvaj tagoj oni dediĉas la antaŭtagmezojn al kunsidoj kun traktado pri la futura laboro kaj planoj de SAT, posttagmeze estas preparitaj interesaj kulturaj kaj turismaj programoj.



## Celoj de SAT

SAT estas organizo, kiu laboras per Esperanto por la Laboristaro tutmonda, por la Homeca solidaro, sed ĝi faris ankaŭ multon por Esperanto, ĉefe kiel eldoninto de Plena Ilustrita Vortaro kaj de aliaj publikaĵoj. SAT-anoj volas forigi el la mondo maljustecon kaj atingi egalrajtecon de homoj senkonsidere de ilia nacieco. En Esperanto ili vidas rimedon de interpopola kunfratiĝo.

Koncerne la "sennaciismon" aperas inter SAT-anoj diversaj konceptoj, komprenoj, interpretoj kaj opinioj. Rifuzante naciismon kaj ŝovinismon, kiuj sin ofte nomas "patriotismo", kelkaj SAT-anoj opinias, ke plej bone estus forigi ĉiujn naciojn, ŝtatojn kaj lingvojn, anstataŭiginte ilin per unu sola tutmonda Esperanto-kulturo. Aliaj vidas nenion malbonan, se homo estas samtempe Terano, Eŭropano, Ĉeĥo, Bohemiano kaj Pragano, same kiel li povas esti samtempe filo, nevo, nepo, patro, onklo kaj avo. Kelkaj "sennaciistoj" rezignis pri sia nacieco, aliaj rezignis nur pri preferigado de propra nacio malprofite al la ceteraj nacioj. SAT do ne postulas de siaj membroj, ke ili malamu propran nacion, ke ili sennaciigu.

## Antaŭkongreso en Prago 1994-07-09/14

Riĉa turisma kaj kultura programo ne nur en la pitoreska historia ĉefurbo de Ĉeĥio - Prago, sed ankaŭ en la belega ĉirkaŭaĵo. La lasta tago de antaŭkongreso komuna aŭtobusa veturado al Strážnice kun trarigardo de la mezepoka perlo, urbo Kutná Hora.

## Strážnice - Ternopil Internacia biciklado

La biciklado startos en Strážnice post la 67-a SAT-kongreso kaj estos entreprenita laŭ la vojo: Strážnice - Budapest - Szolnok - Debrecen - Zahony - op - Transkarpata Ukrainio. La aĝo ne gravas. Interesiĝantoj turnu sin al: Dimitrij CIBULEVSKIJ, a/k 9307, UA-310003 Ĥarkiv, Ukrainio

aŭ

Ivo MISSEN, H.Cleyndertweg 41,  
NL-1025 Amstearsam, Nederlando



## Albert Einstein kaj SAT

Albert Einstein akceptis honoran prezidantecon por la 3-a SAT-kongreso 1923 en la germana urbo Kassel kaj tiel esprimis sian simpatian al Esperanto kaj al la laboristaro. Eŭgeno Adam-Lanti tiam pri la fama sciencisto skribis:

"El la nuntempaj scienculoj Einstein estas certe la plejfama. Post Galileo kaj Newton li venis siavice revoluciigi nian mondkomprenon.

Li ja estas revoluciulo!... Por kompreni lian relativecteorion estas necese forlasi preskaŭ ĉiujn klasikajn konojn, kiujn oni penis encerbigi. Li renversis, neniigis multe da nocioj, ĝenerale opiniataj kiel veroj. La Newton'an hipotezon pri la mekaniko de l'Universo li montris nekontentiga.

En la Sciencularo Einstein superstaras kiel giganto, forrenversanta la malnovajn idolojn antaŭ kiuj de jarcentoj oni kutimis kliniĝi. Sed li ne estas nur forrenversanto; li ankaŭ estas konstruanto. Li starigis novan hipotezon, kiu klarigas la mondon pli bone ol la ĝisnunaj, klasikaj hipotezoj. Li alportis lumon tien, kie antaŭe la scienculoj paŝis en malheleco.

'La sistemo de Einstein', diris Charles Nordmann, astronomo de l'Paris'a Observatorio, 'konsistigas la pli trafan kaj profundan el la provoj faritaj de l' homa spirito por forigi el la Scienco tion, kio ne estas mezurebla, por forpeli el la fiziko tion, kio estas metafizika.'

Sed kelkaj SAT-anoj sendube demandos: kiel tiu genia scienculo povas interesiĝi pri nia movado?

Mi neniel intencas kompari la pensan revolucion, kiun nia movado provas enigi en la Internaciistaro, kun tiu enigita de Einstein en la Sciencularo. Mi nur

memorigu, ke la mondfama fizikisto estas ankaŭ homo havanta tre liberan juĝkapablon rilate la sociajn problemojn. Einstein montris civitanan kuraĝon en 1914, rifuzante almeti sian nomon apud tiujn de la 93 germanaj patriotaj intelektuloj, kiuj sin deklaris solidaraj kun la militistaroj kaj imperialistoj. Se anstataŭ studi sciencajn problemojn, Einstein estus okupiĝinta pri sociaj demandoj, oni prave povas supozi, ke li estus partopreninta la revolucian movadon. Rifuzante apogi per sia nomo la militon, li per tio spirite parenčiĝis al K. Liebknecht kaj Rosa Luxemburg.


Antaŭ nelonge Einstein eksiĝis el la Intelektula Komisiono del'Ligo de Nacioj, deklarante, ke ĉi-lastata institucio ne celas sincere la interpacigon de l'popoloj. Einstein estas ja pacifisto, laŭ la plej bona signifo de l'vorto. Al ĉi tiu homo - la pacifisto - ni nin turnis, petante, ke li bonvolu konsenti doni al nia movado la moralan apogon, kiun li rifuzis al la Ligo de Nacioj. Ni klarigis al li, sen ia troigo, tute sincere kaj malkaŝe, la celon de SAT. Ni avertis, ke en Nürnberg okazos ankaŭ esperantista kongreso. Neniel ni provis trompkapti lian apogon. Estas do en plena scio, ke la mondfamulo donis al nia movado sian moralan apogon. Estis necese tion diri por montri la tutan signifon de tia apogo.

Verdire, skribante la invitleteron mi estis tre skeptika pri la rezulto. Forpasis longa monato. Kaj kiam ni ne plu esperis ricevi respondon, venis la jena letero:

*'Ich bin damit einverstanden, daß Sie mich zum Ehrenpräsidenten Ihres Kongresses machen, danke Ihnen für diesen Beweis von Sympathie und wünsche Ihrem Vorhaben besten Erfolg. Mit vorzüglicher Hochachtung*

A. Einstein.'

Traduko: Perjone mi konsentas, ke vi faru min honora prezidanto de via Kongreso. Mi dankas al vi pro la pruvo de simpatio kaj mi deziras plej bonan sukceson al via entrepreno. Kun altestimo  
A. Einstein.



Nia 3-a Kongreso okazu do sub tiu glora altaŭtoritato. La elpensinto de la relativec-teorio instruu nin diskuti, ne kiel scienculoj, ĉar tiaj ni ne estas, sed laŭ sciencoca spiritstato, t. e. atentante pri faktoj, pri eksperimentoj - kaj ne kiel filpolitikistoj. Scienculoj kapablas diskuti enpasje. Ili ja scias, ke ilia tuta scio kuŝas nur sur hipotezoj, tial ili estas toleremaj, neniel sektemaj.

La SAT-anoj volos certe sin montri morale indaj je la valora apogo, kiun bonvolis doni al ili la genia scienculo A. Einstein.

E. Lanti.'

## KIALOJ DE LA NEEBLO INSTRUI KAJ LERNI ESPERANTON

Bernard Golden

### Metodologiaj esploroj

En lastaj jaroj ofta temo de Esperanto-kongresoj, konferencoj kaj seminarioj estas lingvoinstrua metodologio. Oni daŭre serĉas novajn, pli efikajn metodojn instrui lingvon, kiu laŭ la laŭtaj proklamoj de zelotaj propagandistoj, estas la plej facila el ĉiuj lingvoj en la mondo. La plej freŝdata metodologia semajnfino okazis en Budapeŝto fine de februaro 1993. La ĉeftemo de la oka aranĝo de la Landaj Pedagogiaj Tagoj estis "la studhororo, diskuto pri lecionoj". Laŭ miaj spertoj en pasintaj jaroj, la partoprenantoj, kelkaj el kiuj ne estis pedagogoj aŭ diplomitaj lingvo-instruistoj, sed nur diletantaj instruantoj, konstante ripetis la samajn nociojn. Foje aperis novaj vizaĝoj, sed ne vere novaj ideoj. Ekzistas ankaŭ fakliteraturo pri metodologio, ofte konsistanta el prelegoj kaj referaĵoj legitaj okaze de la konferencoj. Menciindaj estas la sekvaj.

**1. Esperanto kaj ĝia instruado en lernejoj.** Jugoslavia Esperanto-Federacio; Ljubljana 1959. Ĝi enhavas materialon prezentitan dum la Somera Pedagogia Semajno en julio - aŭgusto 1957.

**2. Rudolf RAKUŜA. Metodiko de la Esperanto-instruado.** Gvidilo por instruantoj de la Lingvo Internacia. Ljubljana: Mladinska Knjiga; 1970. Ĝi estas la dua eldono kun kompletigita teksto de la samaŭtora Instrumetodo por Esperanto (Slovenia Esperanto-Ligo; Ljubljana 1957). En 1992 UEA publikigis la trian eldonon.

**3. István SZERDAHELYI. Metodologio de Esperanto.** Tankönyvkiadó; Budapest 1975. En recenzo pri la libro de Rakuŝa, Szerdahelyi malfavore taksis ĝin pro ĝiaj malnovmodaj vidpunktoj pri lingvoinstrua metodologio. Li, do, verkis sian propran metodologian traktaton por uzo de studentoj en la Esperanto-fako de la budapeŝta Scienca Universitato "Lóránd Eötvös".

**4. Zsuzsa BARCSAY (red.). Metodiko en la praktiko.** Esperanto-Centro Paderborn kaj Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1992. Tiu ĉi verko estas kolektaĵo de artikoloj verkitaj de 15 aŭtoroj pri diversaj aspektoj de la instruado de Esperanto. En la antaŭparolo, redaktanto Barcsay skribas jene pri la celo de la libro. "La celo de jena libro estas unuflanke doni ideojn kaj montri jam iritajn vojojn al instruistoj, instruantoj kun ankoraŭ malmulte da sperto (aŭ jam monotoniĝinta rutino) en la instruado de la lingvo Esperanto. Literaturo pri teorio de metodiko ni havas jam, des pli la instruantoj bezonas praktikan helpon." (pĝ. 7).

**5. Tadeusz EJSMONT (red.). El teorio kaj praktiko de Esperanto-instruado.** Lodzo: Lodza universitato; 1988. Tiu ĉi verko estas kvazaŭ la dua volumo de la kolektaĵo de Barcsay. Ĝi enhavas referaĵojn de partoprenintoj en la 21-a Konferenco de Internacia Ligo de esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Lodzo, Pollando, en julio 1987. La kadrotemo estis "La scienca esploro de Esperanto el pedagogia, didaktika kaj lingvopolitika vidpunkto". Ĉar ILEI regule organizas konferencojn ĉiujare, oni povas atendi pli da imponaj kadrotejoj kaj pli da publikigitaj kolektaĵoj de prelegoj. Tamen, la granda demando estas, ĉu fak-konferencoj kaj teoriaj verkoj pri metodologio povas havi pozitivan efikon sur la instruadon kaj lernadon de Esperanto? Ankoraŭ unu tikla temo koncernas la diletantecon instruadon de fake kaj kulture nekvalifikitaj homoj. Tiu problemo estas reliefigita per la semantika kontrasto inter instruisto kaj instruanto. Mi opinias, ke ne estas kaŭzo por optimismo. Senĉese estiĝas novaj lingvo-kursoj, kiuj estas forlasataj de lernantoj. Tre malmultaj el tiuj, kiuj finas la elementan kurson, daŭrigas sian lernadon de la lingvo en kursoj por progresantoj. Kiam mi demonstris, ke ankaŭ la studentoj de Esperanto en la budapeŝta universitato pekas pri lingvaj misaĵoj, d-ro Szerdahelyi koleris, ne ĉar mi

faris falsan akuzon, sed ĉar mi publike rivelis la fuŝan lingvouzon!

### **Kvar klarigoj pri la malfacila lernado de Esperanto**

Pensinte pri diversaj aspektoj de la problemaro, mi surpaperigis kvar manierojn klarigi la nekontentigan situacion, ĉar ŝajnas, ke malgraŭ multaj paroladoj kaj artikoloj, metodologiaj fakuloj ankoraŭ ne sukcesis elimini kelkajn bazajn obstaklojn, barantajn plenan primajstron de Esperanto.

**A. Lernantoj de Esperanto.** Ili estas mal-intelligentaj, maldiligentaj aŭ apatiaj. Kelkaj, sed ne ĉiuj, meritas tiujn karakterizaĵojn. Tamen, tiuj, kiuj ne suferas pro mensaj difektoj, ja sukcesis lerni la gepatran lingvon. Lingvoinstruaj metodikistoj parolas pri interfero kaj neadekvata pozitiva transfero inter la gepatra lingvo kaj Esperanto.

**B. Instruantoj de Esperanto.** Pluraj ne estas kompetentaj instrui, ĉar ilia propra lingva nivelo estas malalta. Mensskua travivaĵo estas aŭdi subnorman prononcadon kaj trovi gramatikajn erarojn en publikaĵoj eĉ de profesiaj instruistoj! La Franca Esperanto-Instituto plendis, ke "la nombro de la malsukcesoj en la atesto pri kapableco elokvente montras, ke la kandidatoj tute ne regis la Esperantan gramatikon. Kiel ili povas ĝin instrui?"

**C. Lerniloj kaj konsultlibroj.** Ili ne adekvate pritraktas malfacilajn gramatikaĵojn kiel la transitivecon de verboj kaj uzon de la refleksivo. Aŭ informoj mankas, aŭ estas malakordoj inter leksikografoj kaj esperantologoj. Teoriuloj elcerbigas komplikajn klasifojn de verboj kaj regulojn por aliaj parolelementoj, kiuj konvenas eble por kabina traktado de la lingvo, sed ne estas praktike uzeblaj, ĉar oni ne kutimas porti konsultlibrojn en la poŝo. Plena Analiza Gramatiko (PAG) ofte konsilas, ke oni reverku ambiguajn frazojn, sed tio ne eblas, kiam oni staras surpiede kaj konversacias.

Alimaniere dirite, ĉiuj reguloj ne estas aŭtomate, senkonscie aplikeblaj. Ju pli ofte estas necese halti por pensi pri elekto inter gramatikaj formoj, des pli malfacila fariĝas la lingvo. Kiu naive elbuŝigas la sensencaĵon, ke la Esperanta gramatiko estas sen esceptoj, trastudu PAG, precipe la sekciojn presitajn per malgrandaj literoj kaj la plurajn rimarkojn.

**D. Esperanto.** La fonto de la malĝusta uzo de diversaj gramatikaĵoj troviĝas en la lingvo mem. Esperanto ja estas facila lingvo, sed ĝi havas kelkajn tre malfacilajn trajtojn, kiuj stumbligas lernantojn kaj uzantojn, senkonsidere de ilia gepatra lingvo, grado de inteligenteco aŭ nivelo de edukiteco. Pri-trakto de tiu ĉi temo estas rigore tabua, ĉar tio minacas renversi kaj refuti la tutan argumentadon de Claude Piron pri "la bona lingvo". Pripensinda demando por legantoj de tiu ĉi artikolo estas: ĉu la mankhava, lamanta instruado kaj lernado de Esperanto karakterizos ankaŭ la duan jarcenton de Esperanto? Se jes, ĉu estas espero por la lingvo kaj la movado?

### **RIMARKIGO DE LA REDAKCIO:**

Ŝajnas, ke la kursanoj estas ofte malsukcesaj, ĉar ili pasive atendas, ke la instruisto aŭ instruanto enkapigos al ili la lingvon, dum aŭtodidaktoj aktive lernas mem, kaj tial ili eble havas pli grandan ŝancon ellerni Esperanton.

## **POLA RADIO 35-jara**

**La Esperanto-elsendoj de Pola Radio festis 4. 4. 1994 sian 35-jariĝon. Sub oferema gvido de Andrzej Pettyn estis disaŭdigitaj miloj da elsendoj kun lingvaj, kulturaj kaj konkursaj programoj. Starto gratulas kaj deziras pluajn sukcesojn!**

## KIEL PRONONCI EN ESPERANTO

Post cent jaroj da ekzisto de Esperanto oni emus diri, ke la demando "kiel prononci" devus esti klara al ĉiuj. Nun du atentigoj pri tiu problem(et)o instigis ankaŭ min pripensi la temon: 1) Lecionaro samtema de Andrzej Pettyn en la Pola Radio, kiu trovis bonan reehon ĉe la aŭskultantoj, 2) artikolo de Bernard Golden en "Esperanto en Skotlando", n-ro 160: "Kies prononcon de Esperanto imitu lernantoj kaj uzantoj de la lingvo?" Golden tie prave etiketas kiel herezan opinion la aserton de Anna Brennan kaj R. Corsetti en ilia "Cirkulero por esperantlingvaj familioj" (1988, jun.: 3), dirantan: "ĉu tio vere gravas, ke infano heredas de sia germana patro la germanan prononcon de Esperanto?" - Male, "la instruantoj devas liberiĝi el la fonetikaj katenoj de la gepatra lingvo, kiel esprimas sin John Wells en 'Lingvistikaj aspektoj de Esperanto'. Por atingi norman prononcon estas necese prepari diskojn kaj kasedojn; krome urĝe estas bezonata Plena Analiza Fonetiko de Esperanto, sed" - diras Golden - "kiu ĝin verkos? La Sekcio pri prononcado de la Akademio de Esperanto stagnas."

La ĉeestantoj de la komuna kongreso de la Ĉeĥa kaj Germana Esperanto-Asocioj en Karlovy Vary (28 - 31 majo 1993) havis eblecon aŭdi germanecan Esperanton el la buŝo de magiisto, do apenaŭ kompreneblan (eble eĉ laŭ iu germana dialekto?). Kaj male, kiel kompreneblaj, klaraj sonis alparoloj de tiuj germanoj, kiuj" liberiĝis el fonetikaj katenoj de la gepatra lingvo" (d-roj Lins, Blanke k. a.)! Ilustre mi tuŝu ankaŭ la prononcon (en alia loko) de la - cetero ŝatata, dokta - d-ro H. Frank (AIS); ĉe li perpleksigis min pli ol unufoje la preskaŭa ellasado de la sono "r" kaj dum liaj prelegoj mi petis ripeti la vorton nekomprenatan, ekz. tiun, kiu sonis al mi kiel "leanaĵo", aŭ "leanaĵo", kaj tiam mi sciigis, ke estu

komprenata "lermaĵo".

Akorau kelkaj miaj spertoj: dum la menciita varsovia lecionaro la kursestro A. Pettyn ĝuste prononcis "homo", jam la sekvintan tagon lia buŝo prononcis "homo".

Ĉu poloj, rusoj, bulgaroj, serboj kaj okcidentanoj vere estas nekapablaj lerni la prononcon, kiu diferencigas inter ekz. horo-horo-koro, ĥolero-kolero, ktp? Mi kredas, estas nur afero de ilia volo kaj ioma trejniĝo (kaj kompreneble de instruisto, kiun ili imitas). - En la Varsovia Radio la prononco estas, kiel konate, ĝenerale tre bona, tamen ankoraŭ plu frapas el sinjorina buŝo la moligado ("samideanjinoj", "nĵia" k.a). "Ĝ" estas polmaniere elparolata "D", ekz. "dis" anstataŭ "ĝis", "duste" (ĝuste), "i-am" (iam), "ki-u" (kiu), "peri-odo" (periodo). La prononcado en la viena Radio ne belsonas al aŭskultanta orelo; ĝi estas germanlingveca; forpuŝas ekz. la "THAmen" anstataŭ la simpla "tamen". Menciante radiostaciojn oni konstatas kontenton, eĉ ĝuon pro la prononcmankado de la Pekina Radio: klara, sen fermitaj vokaloj, sen la daŭra okcidenta "kh-ado" - koncize: "norma" prononco.

Konata brita esperantisto Richard Howard, studinta en universitato la ĝeneralan lingvistikon, modele prononcanta, raportas el esperantista renkontiĝo en Oxford pri la prononcmankado en alparolo de persono bone konata en la Esperanta literaturo:

*"La phroŭghramoŭ ... phlaĉhis al mi ... threj riĉha phrejljghoŭ ... khoŭmejncej khantis unu dej la phathoŭphrenjnhanthoj ... ni ĉhujuj boŭnej amuziĝhis ... Vivu ezbrandoŭ!"*

Videblas la graveco de ĝusta prononcado precipe fare de la instruistoj kaj radioparlantoj, kiujn la lernantoj, memkomprene, imitas.

Do, kia propre estas la ĝusta, "norma" maniero de prononco? Ni memoru, kian prononcon d-ro Zamenhof, dum la 1-a Universala Kongreso (1905), indikis kiel ĝustan; tiun ĉiu devus pripensi kaj sekvi.



Edmont Privat pri tio rakontas [1]: "Oni petis d-ron Zamenhof pri la ĝusta maniero. Li deklamis poemon per s-ino Rosa Junck, kiel modeloj. Ŝi estis aktorino el ĉeĥa deveno kaj elparolis la vokalojn malfermite kiel Slavoj kaj Italoj. De tiam la regulo estis klara por ĉiuj." - Laŭ la "Enciklopedio de E-o" (1933 Budapeŝto, p. 270) s-ino Junck Rosa naskiĝis en Tábor (Ĉeĥio) al geedzoj Bilek. Do, ŝia nomo ĝis la edziniĝo estis Růžena Bílková; edziniĝinte en Italujon ŝi portis la nomon Rosa Junck. Zamenhof agnoskis la ĉeĥan-italan prononcon kiel modelan. John C. Wells, profesoro pri fonetiko, konkludas [2]: "Se oni foje gratulas min aŭ iun alian pro bona prononcado de Esperanto, tio signifas ke mi, aŭ li, sukcese liberiĝis el la fonetikaj katenoj de la gepatra lingvo por alpreni tiujn normojn, ... aŭ ke mi saĝe elektis gepatrojn ĉeĥajn aŭ serbo-kroatajn." - Estas aldonende, ke al la ĉeĥoj en tiu ĉi fenomeno egalas la slovakoj; ili ambaŭ nur devas forkutimiĝi akcenti la unuan silabon de vortoj. Sukcesan ekzemplon pri lemebleco de la prononcado donas la geparolistoj de la Pekina Radio: la sonorano "R", kvankam la gepatra ĉina malhavas tiun sonon! La bona prononcado en la tre oftaj elsendoj de Radio Prago (1945 - 1950) bone influis la prononcmanieron de eksterlandaj aŭskultantoj en 32 landoj. Ekz. studento en Oxford, K. L. Strong, sciigis: "Mi trovas ke viaj elsendoj multe helpas min pri la elparolado de nia lingvo." Nederlandano, T. Tiesen, laŭdis la prononcon: "Vi ĉeĥoj parolas mirinde klare, ke estas ĝojo aŭskulti vin." Alia angla aŭskultanto komunikis, ke ofta aŭskultado al Prago ebligis al li sukcesan ekzamenon pri fonetiko en Esperanto [3]. Konstateblas, ke la instrukciojn de Zamenhof kaj ankaŭ de Wells konfirmas la praktiko, el kio rezultas, ke kursestroj kaj kursanoj observu ilin. Tiel estos atingata eleganteco de parolo.

Jaroslav Mařík

[1] "Historio de la lingvo Esperanto. La Movado 1900 - 1927", (Hirt & Sohn, Leipzig 1927, p. 20)

[2] "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" (UEA, Rotterdama, 1989, II-a eld., p. 26)

[3] Stanislav Kamarýt: "Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio" (ĈEA, Praha 1983, p. 167 - 168)

### Rimarkigo de la redakcio:

Sed ni ne tro iluzi pri la senmankeco de nia ĉeĥa-slovaka prononcmaniero. Jen kelkaj ekzemploj. La sole voĉa ĉeĥa konsonanto "h" malhelpas la ĝustan prononcon de ekz. "... estas homoj". kie la "h" estas senvoĉa, sed kie ĉeĥprononce aperas "... estas homoj". - La ĉeĥmaniera senvoĉigo de vortfinaj voĉaj konsonantoj gvidas al malĝusta prononcado de ekz. "sub la tablo" (sup la ...), "sed li diris" (seĝ li ...) kaj eĉ "lavmaŝino" (lafmaŝino). - La ploziva karaktero de la ĉeĥa vortkomenco "v" malklarigas la kompreneblecon de la aŭskultanto: "via" povas esti aŭdata kiel "ia". - La fonetiko de Esperanto estas ankoraŭ esplorenda.



tiom grava por disvastigo de Esperanto inter junularo, serĉas peranton ankaŭ por Ĉeĥio (abono 350 Kč por 4 numeroj po 44 paĝoj A4). La 6-a numero ĵus aperinta ĉe Eurokka (F-31450 Donnevile, Francio) alportas interesajn artikolojn kaj intervjuojn pri esperantistaj rok-muzikistoj, pri muzikiloj, festi-valoj k.s. Inter la personoj eminentas Ĵomart kaj Nataŝa, Ĵak Le Pul, Micke Englund, Martin kaj Anders, Juhani, Eckhard Bick k.a.

## VIA(J) RIDETOJ(N) SERĈATAS EN SAMARKANDO

Saluton! Se vi ankoraŭ ne forgesis kiel rideti, ridetu do (kial ne?) kaj sendu tiun ĉi rideton (aŭ eĉ ridetojn) al nia internacia ekspozicio sub la titolo "LA MONDO RIDETAS". Vi ankaŭ povas inviti rideti kun ni viajn parencojn, amikojn, kolegojn, najbarojn, hejmbestojn... Partoprenante en nia plej serioza transnacia kaj translingva ridet-projekto, vi havos la ŝancon trovi novajn amikojn, rakonti pri vi mem kaj diri (deziri), kion ajn vi volas, al homoj vizitontaj la ekspozicion.

Do, prenu kaj ekspedu viajn ridetojn al ni en ajna ebla formo (foto, desegnaĵo, printaĵo ktp.). La aĝo de ridetontoj kaj la kvanto de viaj kontribuoj estas NELIMIGITAJ. Dankon.

Eku do kaj startu rideti... plejeble baldaŭ, hodiaŭ, tuj, ĝuste nun. Atendante viajn ridetojn ĝis la fino de 1994, samideane restas kun amikaj ridetoj, ridet-aktivuloj de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, pk. 76, UZ-703000 Samarkand, Uzbekistano.

## LETERVESPEROJ EN 2500-JARA SAMARKANDO

Samarkandaj esperantistoj preparas nun du internaciajn letervesperojn: aŭguste 1994 - memore al 600-jariĝo de granda scienculo-astronomo kaj ŝtata aganto Ulugbeg (la nepo de Tamerlan), kies jubileo estas celebrata ĉijare sub aŭspicio de Unesko septembre 1994 - dediĉe al la 3-a datreveno de sendependiĝo de Respubliko Uzbekistano.

Viaj tiutemaj kontribuoj (salutleteroj, reĥoj, nacilingvaj artikoloj, libroj, fotoj, dokumentoj pri la epoko de Timuridoj,

Ulugbeg, Uzbekistano ktp.) estas tre bonvenaj. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nia nacilingva gazetaro. Ni pretas rekompenci viajn sendaĵojn laŭ via deziro per uzbekaj memoraroj. Anticipan dankon al ĉiuj. Adresu ĉion tuj al: **Esperanto-klubo, pk. 76, UZ-703000 Samarkand, Uzbekistano.**

(sendis Lubomír Huf)

## Sinonimoj de OKAZI

Nia redakcio ricevas multajn raportojn pri renkontiĝoj, en kiuj svarmas kaj monotonas la verbo "okazi": "Tiam kaj tie okazis renkontiĝo, matene okazis prelegoj, posttagmeze okazis promeno, vespere okazis dancamuzo, dum kiu okazis tombolo - la renkontiĝo al ĉiuj tre plaĉis kaj ili esperas, ke post unu jaro ĝi okazos denove." La ŝablono, inkluzive de la lasta nenion diranta frazo, fariĝis preskaŭ normo por niaj raportantoj.

Lernu kaj uzu ankaŭ aliajn esprimilojn: "Tie kaj tiam realiĝis renkontiĝo, matene oni aŭskultis prelegojn, posttagmeze nin ripozigis promenoj en la ĉirkaŭaĵo, vespere estis aranĝita dancamuzo enkadre de kiu efektiviĝis ankaŭ tombolo. Post unu jaro ĝis revido!" Aliaj uzablaj verboj: okazigi, organizi, partopreni, ĉeesti, danci kaj amuziĝi, muziki kaj kanti, tomboli, prelegi, aplaŭdi al, prezenti, admiri, admirigi kaj entuziasmiĝi per, fari, plenumi ktp.

- mm -

La plej ofta...

## Eventoj

Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!  
Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...

## EL NIAJ KLUBOJ KAJ RONDETOJ

**Prostějov** - Klubanoj kunvenas regule ĉiu-  
ĵaŭde je la 17a horo en nova kunvenejo je la  
adreso Husovo nám. 85, proksime de staci-  
domo. Esperantista klubo aranĝis en kinejo  
"Metro" unumotanan ekspozicion pri espe-  
rantista korespondo. En Svatoplukova strato  
denove ekfunkciis la kluba vitrino kun infor-  
moj pri Esperanto kaj pri la klubaj progra-  
moj.

**Kunlaboro de mezmoraviaj esperantistoj**  
Esperanto-klubo en Prostějov iniciatis kreon  
de komuna laborkomitato, kies celo estas  
kunordigi la agadon de esperantistoj en meza  
Moravio. Membroj de la komitato estas re-  
prezentantoj de E-grupoj en Olomouc,  
Prostějov, Přerov, Uničov kaj Vyškov.  
Januare ĝi kunvenis en Olomouc, februare  
en Prostějov okaze de jarkunveno de la tiea  
klubo. En marto la komitato kunvenis deno-  
ve en Olomouc por pritrakti la kunlaboron  
de la partoprenantaj grupoj dum la dua  
kvaronjaro de ĉi tiu jaro.

## NEKROLOGO

Josef Vomela, konata esperantisto el  
Třebíč (ŝoforo de E-aŭtomobilo) mortis  
pro insida malsano la 10-an de marto  
1994 en la aĝo de 59 jaroj.

### DONACOJ AL ĈEA

Gustav Heczko	300,-
Vlastimil Blažek	200,-
Ing. Karel Janouš	100,-
Jaroslav Karhan	100,-
Karel Čada	50,-
Josef Vondroušek	200,-
Drahomír Kočvara	100,-
Anonimulo el Brno	1000,-
Anonimulo el Ostrava	200,-

## La X-a datreveno de aperado de ACTA COMENIANA

Sborník J. A. Komenského (esploroj pri la  
verko kaj vivo de J. A. Komenio) estis temo  
de Kolokvo en la Filozofia Instituto de ASC.  
en Prago, la 4-an de febr. 1994. Jaroslav  
Mařík uzis la sekvan diskuton por memori  
pri la aktiva sinteno de JAK al planlingvo,  
kiukaŭze Komenio estis nomita de la kome-  
niologo Jan Hýbl "La patro de la ideo de  
Esperanto." Jam tri rezolucioj de UNESCO  
apogas la rolon de la internacia lingvo Espe-  
ranto. La ĉefo de la Kolokvo akceptis ĉeh-  
lingvan artikolon de prof. J. Hendrich "Arte-  
farita lingvo laŭ J. A. Komenský".

- jm -

## NEKVASOVY

En la vilaĝo Nekvasovy (direkto Plzeň -  
Nepomuk - České Budějovice) organizas  
pilsena Esperanto-klubo III-an renkontiĝon  
(31. 7. - 17. 8. 1994). **Programo: turisma  
restado unu- aŭ dusemajna.** Loĝado en la  
kabano Sokol en 4-litaj ĉambroj kun duŝejo,  
varma akvo. Komuna lavmaŝino, simpla  
manĝo, bone ekipita klubejo, pilksportejo,  
malgranda naĝejo. Kvietara barriĉa regiono.  
Proksima trajno (30 minutoj de piediro)  
ebligos viziti najbarajn urbojn: Nepomuk,  
Strakonice, Horažďovice, Blatná ktp.  
Prezo ĉ. 720 Kč por unu semajno, 1300 Kč  
por du semajnoj. Aliŭt tuj ĉe la adreso: Jiří  
Vomáčka, Koterovská 30, 301 41 Plzeň.

E. LANTI

**67-a SAT  
KONGRESO  
Strážnice  
16.-23. 7.  
1994**



## OMBROJ DE SVASTIKO

Ekzistas dokumentoj pri naŭ faŝismaj-rasismaj organizaĵoj en Ĉeĥa Respubliko. Ili eldonas eĉ 11 periodaĵojn. Ili korpe kaj ideo trejnas siajn anojn. Apartenas al ili du internaciaj movadoj: rasisma *Hammerskins* kaj naziisma NSHE (Naciece-socialisma movado Eŭropa). La plej konataj ekstremistoj ĉe ni estas *skinheads*. Ne temas pri kompakta organizaĵo, ili eĉ interbatalas por gvida rolo. Inter ili *sharpskins* estas eĉ kontraŭ la rasismo, male *naziskins* adoras militemon kaj NOF (Nacia Faŝisma Komunumo) proklamas senkompromisan nacionalismon, faŝismon kaj malamon al judoj kaj, kompreneble, ĝi akcentas la adoron de la fizika forto kiel simbolon de ĝia pretendo al hegemonio.

Supozeblas, ke la ĉeĥa popolo, kiu tiom suferis pro la faŝismo kaj kiu spertis ekstermigan plagon kontraŭ la juda popolo, konservos siajn spertojn por ĉiam kaj transdonos ilin al la sekvantaj generacioj. Eble oni tion ne plenumis konsekvence. Laŭsplore sep procentoj de nia loĝantaro infektigis je antisemitismo. Spertuloj taksas nombron de aliĝintoj al NOF jam ĝis tri mil. Eble ne timinda nombro, sed ŝokas la fakto, ke tiaspeca ideologio altiras plejparte junulojn ĝis tridekjarajn. Ilia aĝo mem atestas, ke ili ne spertis la judan problemon kaj ke iliaj scioj pri faŝismo estas esence torditaj kaj intence misinterpretitaj. Montriĝas, ke ili celas unualoke realigi sian senbridan impeton de perfortemo kaj ili klopodas pravigi ĝin antaŭ la publiko per iaspeca ideologio. Procedo, kiu ĉiam ripetigas en la historio. Kaj mi ankoraŭ ne menciis anarkiistojn, satanistojn kaj la movadon "punk".

Policistoj, ĵurnalistoj kaj verkistoj, kiuj praktikas la temaron, idente respondas la

demandon pri la origino de tiaspecaj organizaĵoj: La uloj kun denaska aŭtoritato konvinkas junajn homojn, ke la socio ne kapablas solvi kelkajn problemojn, kiel ekzemple migradon de fremduloj, neadaptiĝemon de ciganoj kaj la kreskantan krimecon. Ili klopodas enkapigi al siaj aŭskultantoj, ke ĝuste ili estas antaŭdestinitaj solvi la problemojn per forta mano kaj "purigaj operacioj". Jen ununura vojo al la savo. Kun la preteksto, ke ili mem enplantas justecon, ili prezentas al siaj simpatiantoj persiste kaj iom post iom siajn modelojn. Tiel multaj junaj homoj iĝas pretervole kaptataj en la saman krimecon, kontraŭ kiu ili ribelis. Krome ĉispecaj movadoj altiras ankaŭ psiĥopatojn kaj perfortemulojn.

La misteroza atmosfero de ilia ekscentra medio enŝteliĝas ankaŭ en kelkajn muzikajn trupojn. Sed okazis ankaŭ, ke iu muzikgrupo, akuzata pri disvastigado de ia rasa maltoleremo, fine pro inertece de la policaj kaj juraj instancoj restis nepunita. La grupo nun furoras, iliaj abomenaj produktoj, libere raŭkantaj pri piedbatoj, bruligo de alikoloruloj ktp. ja eĉ pli kare vendiĝas. Terure, ĉu?

Sed la policaro mem staras antaŭ nefacila tasko. La paragrafo kontraŭ rasa malamo malofte estas aplikata. Homoj ne volonte atestas, ili timas. Kaj la krimeco kreskas. En la lastaj tri jaroj kreskis rasisme motivitaj krimoj el 25 al 46. Ni timu tiujn, kiuj pretendas propre juĝi kaj kondamni, farante mem krimajn agojn. Ni estas avertataj: ni bezonas senkompromisan policaron, konsekvencan procedon de la justico, engaĝitan publikan opinion, prudentan familian edukon. Imagu: praga skino, dekplijara dorlotata filo de renoma reprezentanto de nia kulturo, sopiras viziti londonan Muzeon de vaksaj figuroj de madame Thousand por triumfe montri al ceteraj pubertuloj foton, sur kiu li staras apud Adolf Hitler. Kaj la policaro kontribuas al la efektivigo de lia revo... Kaj kion ĉiu el ni, plenkreskuloj? Tiuj el ni, kiuj

memoras la teruran tempon, ni klarigu tion al la junuloj. Ja faŝismo, kiu pretendis superregi la tutan mondon, ankaŭ elkreskis el malgrandaj batalaĉ-mentoj de fanatikuloj. Proksimiĝas kvindeka datreveno de la venko super la faŝismo. Ĉu vera venko?

Jindra Klímová  
(tradukis Mgr. Karel Kraft)

## Propono de UEA

Foliumante la Jarlibron de UEA vi certe rimarkis, ke post adresojde la delegitoj aperas ofte ankaŭ la literoj LG kun informoj pri la Esperanto-grupo de tiu urbo. Tiuj anoncetoj celas helpi vizitantajn esperantistojn por trovi la lokan kunvenejon. La prezo de la LG-anoncetoj dependas de la UEA-kotizo por via lando en la kategorio "Membro-Abonanto": unu linio kostas dekonon de ĝi. Por Ĉeĥio kaj Slovakio kostas unu linio 75 kronojn.

## La Skolta Mondo

Gazeto de skoltaj esperantistoj estas abonebla pere de landa peranto: Pavel Sittauer, Hartmannova 1128, 674 01 Třebíč. La 12-paĝa revueto aperas 4-foje jare.

### SKOLTA ESPERANTO-LIGO SLOVAKIA (SELSLO)

estis fondita de Miroslav Havráněk en Bratislava (Adreso: SELSLO, Leškova 16, 811 04 Bratislava). SELSLO invitas kunlabori lernejojn en Slovakio kaj Ĉeĥio pri skolta edukado de infanoj kaj gejunuloj, ekz. sanitarajn mezlernejojn.

### MIROSLAV MALOVEC PRI TRADUKADO DE BELETRO

Apenaŭ iu el ni submetus sin al operacio farata de homo talenta, sed sen kuracista kleriĝo, sen scio de anatomio kaj medicino ĝenerale, sen speciala kirurga trejnado kaj sen libroŝranko plena de fakverkoj. Beletrajtoj ofte devas suferi esperantigan operacion plenumatan de personoj preparitaj nek teorie, nek praktike, kiuj opinias, ke poŝvortareto povas anstataŭi talenton, sinpreparon kaj bibliotekon. Ne al ili stariĝas la haroj dum legado...

La supozata talento helpas pli rapidan kaj ĉefe pli profundan kleriĝon, sed ne povas ĝin substitui. Kaj eĉ talento kun kleriĝo komune ne sufiĉas sen libraj helpiloj: gramatiko kaj granda vortaro de la gepatra lingvo kun leksikono de fremd-vortoj, Plena Gramatiko kaj Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, diversaj enciklopedioj (ĝenerala, muzika, zoologia kaj botanika, atlasoj k.s.), frazeologiaj, etimologiaj kaj sinonimaj vortaroj.

Patralingvaj vortarojn kaj enciklopediojn la tradukanto bezonas por perfekte kompreni la tradukatan originalon, gramatikojn por scii la anatomion de lingvoj. Ne sufiĉas koni nur Esperanton kiel solan fremdan lingvon: nur konatiĝo kun pluraj idiomoj komprenigas, kio estas internacieco, ekvivalenteco kaj adekvateco. Frazeologian esprimon necesas ĉiam kontroli en pluraj lingvoj, ĉar internacieco povas esti nur ŝajna. Sole ni ĉeĥoj deziras "bonan sukceson kaj rompu la nukon!", dum aliaj nacioj ne vidas en rompadu de la nuko feliĉon. Eĉ la "Ijoba sciigo", devenanta el Biblio, ne estas intencacia: ceteraj eŭropaj popoloj uzas "malbonaŭgura sciigo", kaj Ijob por ili simbolas neŝanceleblan paciencon, ne katas-trofajn informojn. Grandaj vortaroj kaj frazeologioj de diversaj lingvoj do ne manku sur via librobreto!

Ekzistas libroj (prunteblaj en publikaj bibliotekoj) pri lingvistiko, stilistiko kaj teorio de

tradukado, kiujn tradukemuloj nepre ne evitu. Tradukanto devas scii, kio estas lia devo rilate al la aŭtoro, al la legotoj, al la lingvo kaj verko (bedaŭrinde multaj eĉ ne konscias, ke iaj devoj ekzistas!). En la libroj spertaj tradukistoj klarigas per konkretaj ekzemploj, kiel ili solvis diversajn tradukistajn problemojn, kiel ili analizis la originan tekston, kiaj fuŝoj plej ofte minacas nerespondecan tradukanton.

Ne ekzistas du vortoj kun absolute sama signifo. La ekvivalentoj en dulingvaj vortaroj estas nur proksimumaj, same kiel samlingvaj sinonimoj (ekz. peni, klopodi, strebi, aspiri). Krome, ĉiu vorto havas plurajn funkciojn. Nia cerbo ŝparas sian memoron, aplikante malnovajn vortojn por novaj signifoj, ĉu izole, ĉu engrupe. Vortoj havas signifojn bazajn (ekz. kapo), metaforajn (kapo de familio, de ŝraŭbo, de brasiko, de martelo) kaj frazeologiajn (rompi al si la kapon, enbati ion en sian kapon). Laŭ uzeblo ili estas neŭtralaj (normaj) kaj karakterizaj (emociaj, poeziaj, slangaj, dialektaj). Karakteriza estas ĉio, kio rompas la neŭtralecon, ekz. personigo de senvivaĵoj: "Sur la tablo gaje palpebrumas petroldampo, kaj sub la tablo dorme oscedas duonŝirita boto, malĝentile elpuŝante sian langon. "Verkanto kaj tradukanto devas koni ne nur la signifojn de la uzata vorto, sed ankaŭ ĝiajn karakterizajn valorojn (neŭtrala, poezia aŭ vulgara, dialekta aŭ slanga, tenera aŭ insulta, kolera aŭ plora ktp.).

Ĉiu lingvo posedas proprajn frazeologiajn, metaforajn kaj emociajn esprimojn, kiuj diferencas de similaj, tamen malidentaj esprimoj en aliaj lingvoj. Tial traduko estas en la realo nur imitaĵo de la originalo kreita el alia materialo. Kvazaŭ oni devus ludi simfonion havante je dispono nur akordeonon aŭ kopii marmoran statuon ne posedante marmoron. Traduki necesas ne vortojn, sed impresojn (bildojn kaj emociojn), kiuj estas propraj al beletra esprimado. La samaj impresoj estas atingeblaj ofte per aliaj vortoj ol en la

originalo, ne malmultajn absolute ne eblas atingi - la tradukanto devas kompensi ilin per similaj impresoj aŭ tute rezigni pri ili.

La lingvoj diferencas ankaŭ per siaj kutimoj kaj inklinoj. Ekzemple en la ĉeĥa abundas et-vortoj (mi trinkos kafeton kaj ĝuos dormeton) kaj la adjektivo "bela" (vi bele min surprizis, vi estas bela kanajlo, bele eksidu kaj atendu min), dum en aliaj lingvoj dominas aliaj miskutimoj (troa uzado de fremdvortoj, de pasivaj verboformoj, de abstraktaj substantivoj, de poeziaj aŭ religiaj vortoj ktp.). Kio en unu lingvo estas normala kaj neŭtrala, en alia efikas strange kaj karakterize. La tradukanto devas konscii la diferencojn kaj elekti taŭgajn rimedojn por interpreti la originalon. Li ne povas simple traduki vorton per vorto kiel tradukmaŝino.

La forton de bildo kreskigas konkretaj vortoj (sur tilio kaŭras pasero kaj trilas) kaj radik-vortoj (griza trista tago), malkreskigas ĝeneralaj esprimoj (sur arbo sidas birdo kaj kantas) kaj derivaĵoj, ĉefe mal-vortoj (sensuna malgaja tago). Ilia kombino reguligas la forton (en griza, malgaja tago sidis pasero sur tilio kaj kantis). Tradukantoj tendencas al malkonkretaj vortoj kaj sencie malfortigas la bildojn. Tradukante slangojn aŭ dialektojn male minacas danĝero, ke la tradukisto troigos la karakterizajn vortojn kaj faros el saĝa, bonkora popola parolanto maldecan kaj malsaĝan fi-vulgarulon. Necesas ĉiam zorge pesi.

[1] KALOCSAY, Kalmán - WARINGHIEN, Gaston: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, kvara laborita eldono, UEA, Rotterdam 1980, 599 p.

[2] WARINGHIEN, Gaston: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, represo de la tria eldono kun suplemento, SAT, Paris 1987, 1303+45 p.

[3] EICHHOLZ, Rüdiger: Esperanta Bildvortaro, la moderna vortaro de la interetna lingvo en kiu la terminoj po 25 000 objektoj estas difinitaj per bildoj, Esperanto

- Press, Ontario 1988, 880 p.
- [4] CSISZAR, Ada - KALOCSAY, Kalmán: 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj, HEA, Budapeto 1975, 188 p.
- [5] KALOCSAY, Kalmán - WARINGHIEN, Gaston - BERNARD, Roger: Parmasa Gvidlibro, dua eldono reviziita kaj kompletigita, PEA, Warszawa 1968, 160 p.
- [6] CHERPILLOD André: Nepivaj vortoj, listo de 6800 vortoj netroviĝantaj en PIV, eldono de la aŭtoro, 1988, 180 p.
- [7] OJALO, Jaan: Esperantaj sinonimoj, UEA-FE, 1993, 96 p.
- [8] KRAUSE, Erich-Dieter: Deutsch-Esperanto Wörterbuch, Leipzig 1983, 596 p.
- [9] LE PUIL Jacques - DANVY Jean-Pierre: Grand Dictionnaire Francais-Espéranto, Paris 1992, 939 p.
- [10] LEVÝ, Jiří: Umění překladu (Arto de tradu-kado) Panorama, Praha 1983, 399 p.
- [11] LEVÝ Jiří: České teorie překladu (Ĉeĥaj teorioj de tradukado), SNKLHU, Praha 1957, 947 p.
- [12] Kniha o překládání (Libro pri tradukado), Praha 1953, 358 p.
- [13] Překlad literárního díla, sborník současných literárních studií (Traduko de literatura verko, kolekto de nuntempaj eksterlandaj studaĵoj), Odeon, Praha 1970, 358 p.
- [14] PECHAR, Jiří: Otázky literárního překladu (Demandoj de literatura traduko), Československý spisovatel, Praha 1986, 88 p.
- [15] HRALA, Milan: Současnost uměleckého překladu (Nuntempo de la beletra traduko), Československý spisovatel, Praha 1987, 75 p.
- [16] LOTKO, Edvard: Čeština a polština v překladatelské a tlumočnické praxi (La Ĉeĥa kaj la pola en la tradukista kaj interpretista praktiko), Profil, Ostrava 1986, 215 p.
- [17] MISTRÍK, Jozef: Kapitoly zo štylistiky (Ĉapitroj pri stilistiko), Bratislava 1977, 248 p.
- [18] MISTRÍK, Jozef: Štylistika (Stilistiko), SPN, Bratislava 1985, 584 p.
- [19] HUBÁČEK, Josef: Učebnice stylistiky (Lernolibro de stilistiko), SPN, Praha 1987, 220 p.
- [20] UHLÍŘOVÁ, Ludmila: Knižka o slovosledu (Libro pri vortordo), Academia, Praha 1987, 160 p.
- [21] INGARDEN, Roman: Umělecké dílo literární (Artverko literatura), Odeon, Praha 1989, 424 p.
- [22] MATHESIUS, Vilém: Jazyk, kultura a slovesnost (Lingvo, kulturo kaj literaturo), Odeon, Praha 1982, 528 p.
- [23] SEKERA, Jaroslav: Dar slova (Donaco de vorto), Profil, Ostrava 1980, 224 p.
- [24] CEJTLIN, Alexandr Grigorjevič: O práci spisovatele (Pri laboro de verkisto), Praha 1973, 350 p.
- [25] ONDRUŠ, Šimon - SABOL, Ján: Úvod do štúdia jazykov (Enkonduko en studadon de lingvoj), SPN, Bratislava 1981, 317 p.
- [26] EKHART, Adolf: Základy jazykovědy (Fundamentoj de lingvoscienco), SPN, Praha 1984, 187 p.
- [27] PALEK, Bohumil: Základy obecné jazykovědy (Fundamentoj de ĝenerala lingvoscienco), SPN, Praha 1989, 286 p.
- [28] PAVELKA, Jiří: Anatomie metafory (Anatomio de metaforo), Blok, Brno 1982, 200 p.
- [29] HUBÁČEK, Jaroslav: O českých slanzích (Pri ĉeĥaj slangoj), Profil, Ostrava 1979, 214 p.
- [30] SCHÖNOVÁ, Ludmila: Jak se to řekne německy (Kiel oni diras germane), SPN, Praha 1975, 1340 p.
- [31] VLASÁK, Václav - LYER, Stanislav: Česko-francouzský slovník (Ĉeĥa-franca vortaro), SPN, du volumoj, SPN, Praha 1987, unua volumo 1040 p. + dua volumo 896 p.
- [32] Slovník spisovné češtiny pro školu a veřejnost (Vortaro de normigita ĉeĥa lingvo por lernejo kaj publiko), Academia, Praha 1978, 800 p.
- [33] KLIMEŠ, Lumír: Slovník cizích slov (Vortaro de fremdaj lingvoj), SPN, Praha 1981, 790 p.

## ESPERANTO-POETOJ NE MORTIS

Ili kreas diligente, vane serĉante legantojn kaj aĉetantojn. Mankas ankaŭ kritikistoj, kiuj minimume registrus iliajn verkojn.

Sur mia skribotablo kuŝas tiuj ĉi poezilibroj"

**1992**

**E. V. Tvarožek: SOLA EN SUNSUBIRO.**

Eldonis BEKO, Bratislava. Formato 11x19.5; paĝoj 57. Ilustrita de M. Nosálová. Eldonkvanto 1000 ekzempleroj. Postparolo de S. Košecký. Anonime verkas li sub nomo Vladimír Gazda.

**EDWIN de KOCK: VOJAĜOJ kaj aliaj poemoj.**

Eldonis Flandra Esperanto-Ligo. Formato 13x20. Paĝoj 148. Antaŭparolo de Jiří Karen. Pri la vivo kaj verkado. Responde al Jiří Karen. Prezo ne indikita, ankaŭ ne kvanto de la ekzempleroj.

**1993**

**Gerrit Berveling: KANTO PRI MINOTAŬRO kaj aliaj poemoj.**

Eldonis Flanra Esperanto-Ligo. Formato 13x20. Paĝoj 135. Enkonduko de Marjorie Boulton. Prezo ne indikita.

**1994**

**Rikardo Ŝulco: LA VIRO EN LA LUNO.**

Prozo, poezio. Eldonis Esperanto-Centro Paderborno, Germanio. Impona enhavo kaj luksa en aspekto. Paĝoj 400. Multaj konataj aŭtoroj en traduko de R. Schulz. Aŭtoroj Arent, Baumgarten, Brecht, Kleist, fratoj Grimm, Hebel, Fr. Kafka, E. Kant, Cocteau, Pertronus, R.M. Rilke, Ŝulco, R. Wedekind. Tre interesa enhavo. Sur paĝoj 184-207 estas publikigita la verko de Jiří Karen: Antaŭ la naŭa ondo/L. V. Beethoven, tradukita el la

ĉeĥa de Ludvík Kundera germanen. El la germana tradukis ĝin Rikardo Ŝulco esperanten.

**Kazimej Štůrek: SOPIRO AL PURAJ**

**FONTOJ.** Poemoj. Formato 9x23. Eldonkvanto: 10 ekzempleroj por liaj amikoj. Sopoty 1994. 47 paĝoj. Vere belegaj poemoj de nia pola amiko kaj kreinto. Tradukoj el la pola esperanten, el Esperanto polen. Originale verkitaj poemoj en Esperanto. Poemoj rimitaj, en libera versmaniero, tono tragika, mediteme analiza, ĝoje afabla, trista, satira. Komprenebla kaj belsona. Mi rekomendas...

Kaj ĉu nia poeto Karen mortis literature?, demandis min kelkaj samideanoj. Neniel, mi respondas. Mi diligente laboris. Sed ĉar eldoni poeziaĵojn nun malfacilas pro financaj problemoj, mi laboris en la sfero de la prozo. Al mia 75-jara jubileo en la jaro 1995 mi preparis por nia dokumenta centro publikajon:

**Jiří Karen: MIA MIGRADO TRA LITERATURA ESPERANTUJO.**

Fotokopioj de ĉiuj artikoloj, eseoj, kritikoj, tradukoj, originale verkitaj poemoj en Esperanto aŭ tradukitaj esperanten. Dokumentoj pri organiza aktivado de Praga skolo. K. SZCZUREK verkis tiun ĉi poemon pri la Praga skolo:

*En la ĝardeno de la poezio  
vi ekdeziris planti novajn florojn,  
riĉigi ties buntan kaj odorajn,  
ĝin pridonaci per plia gracio.*

*Sed en la streb' elformi lingvon vivan,  
kapablan ridi, plori, flami, glimi,  
povantan ĉion nomi kaj esprimi,  
renkontis vi koleron agresivan.*

*Kaj ekŝutiĝis sakroj kaj riproĉoj,  
konzervativaj akuzoj multaj,  
argumentetoj fanatike stultaj  
pereon proklamantaj mornaj voĉoj.*



*Rezulte la multjara streĉa peno  
kolapsis, venis stagno kaj silento,  
kaj - kvankam kvietigis la lamento -  
vin plu doloras pragskola geheno.*

*La poezi' en Prago nun ne sonos,  
sed ne abĵetu viajn lirojn, male,  
agordu ilin noble, ideale,  
ĉar via arto denove burĝonos.*

*Tiam poetoj novaj al vi venos,  
potencos pli la riĉigita kanto  
per bunt' sparkanta kiel diamanto,  
kaj la Verdpoezia Mond' vin benos.*

Kion diri al tiu ĉi poemo? Praganoj ne dormas. **Eli Urbanová** eldonos en Brazilo sian aŭtobiografian romanon "La hetajro dancas", **J. Rumler** eldonis en Brazilo belege ekipitan poemon "La ĉevalo" kaj nur por montri sian majstrecon, li tradukas siajn poemojn en la latinan lingvon. Mi jam supre menciis, ke en la granda verko eldonita en Germanio aperis mia poemaro "Antaŭ la naŭa ondo/L.van Beethoven". Kaj do ne veras, ke ni dormas. Nur ni kunlaboras kun la fremdaj esperantistoj konstatinte, ke en Bohemio fariĝos iu fama nur se li famiĝis en la fremdaj landoj. Kore kaj senriproĉe salutas niajn legantojn

Jiří Karen

**P. S.:**

Kaj tamen unu riproĉeto al niaj esperantistoj: Kiam praganoj meditis pri la riĉigita Esperanto en sfero de la poezio (kaj NUR en tiu ĉi sfero validas vere nia peno), naskiĝis granda eĥo. Kaj poste, se ili verkis jam nur en normala Esperanto, iliaj verkoj estis monde kaj hejme sen atenco.

Ĉu vere la afero interesas nin nur se ni povas kvereli kaj kontraŭ verkantaj ataki? Ĉu fakte veras

la slogano: hejme neniu estas profeto?

## EL POPOLA ĈINIO DENOVE EN ĈEĤIO

Dank'al la peranto de la gazeto El Popola Ĉinio por Ĉeĥio, s-ano Vláďa Hasala, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice, telefona numero: 0631 / 942 507 kun tel. registriilo eblas aboni tiun ĉi konatan revuon en nia lando per Kĉ.

La abonotizo estas la sama kiel en 1993, do 430,- Kĉ por la jaro 1994. Specimenan ekzempleron de la gazeto eblas ricevi kontraŭ antaŭpago de 20,- Kĉ ĉe la sama adreso de la peranto.

El Popola Ĉinio, lanĉita maje 1950, estas monata revuo, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo kaj legata en pli ol 100 landoj. Formato: 26 x 18,50 cm, 52 paĝoj kun 12 koloraj kaj 8 nigraj-blankaj fotoj. La plej luksa Esperanto-revuo.

El Popola Ĉinio konigas la politikon, ekonomion, historion, kulturon, popolan vivon kaj E-movadon de Ĉinio, ne evitas esperantologiajn studojn, originalajn novelojn. Ŝatataj estas rubrikoj "E-movado", "Inter Ni", "Por Komencantoj", "Meti-artajoj", "Sur Stratoj", "Por Via Sano", "Sur nia Librobreto", "Malnovaj Ĉinaj Filozofoj" k.a.



## ASISTI - Tábor 1994 sukcesa Interreligia Seminario

Sub la mallongigo ASISTI kaŝigas Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj, fondita en 1989. Ekde tiam okazis ties jarkunvenoj dum la UKoj kaj aperadas - ĉiam pli impone - ĝia presorgano ASISTilo, inspire, sed bedaŭrinde ne tre ofte. Nun en Ĉeĥio ASISTI por la unua fojo aranĝis la interreligian seminarion (plej supezeble la unuan tiuspecan aranĝon en la historio de E-movado!), kun la ĉeftemo: "Neniu estonto sen interreligia paco: akcepti diferencojn, venki barojn, serĉi komunon".

En la seminario ni efektive ne havis malfacilojn realigi tion.

Eble interalie ĉar tradicia renkontiĝo inter reprezentantoj por establitaj eklezioj ĝi efektive ne estis, parte ĉar pro praktikaj kialoj la seminario okazis dum Pasko, kiam devoj hejmlokaj retenas pastrojn kaj aliajn preĝejajn oficulojn.

Jam en la sinprezenta rondo montriĝis, ke entute ĉirkaŭ la trideko de partoprenantoj (el 8 landoj kaj eĉ pli da nacioj) grandparte estas homoj kiuj devis trovi siajn proprajn kaj ofte malfacilajn vojojn al persona mond-koncepto, malferma al religia saĝo multflanka. Inter ni estis anoj de kvakerismo, bahaismo kaj taoismo, krom kelkaj pro-testantoj kaj katolikoj, kaj ankaŭ pluraj kiuj ne aliĝis al iu religia grupiĝo. Bedaŭrinde kaj iom mirige nur estis, ke ĉeesto de enlandaj esperantistoj estis konsiderinde pli malalta ol ni povus antaŭsupozi.

Menciende estas, ke dank'al iniciato de s-ano Laube, la aranĝo estis perletere persone salutita de la praga ĉefepiskopo - iama aktiva esperantisto - kaj de la episkopo de Hradec Králové, E-simpatianto. La partoprenantoj aprezis tiun ĉi honoron kaj esprimis ĝin ankaŭ en la komuna respondo.

La praktikan aranĝon profesiese faris Vladimír Dvořák el Prago, dum lia edzino Pavla prizorgis la kulturalan fonon. Jam je la alveno ni tuj entemiĝis ricevante ŝian antologieton el diversfontaj religiaj skriboj. En la postaj tagoj ŝi gvidis nin tra la malnova urbo, tra la pensaro de Komenio (pri la Ĝenerala konsultiĝo pri reboniĝo de la homaj aferoj), tra riĉa tradicio de spirita muziko de Ĉeĥio kaj gitarekante tra E-kantareto interreligia. Aliaj partoprenantoj, nome

Bernhard Westerhoff (Germanio), Martin Howard (Britio), Bradio Moro (Usono/Polando) kaj Mike Sadler (Britio/Hungario) prezentis siajn kredojn kaj nekredojn, enkonduke al stimulaĵ interparoloj pri toleremo, etiko, amo, homanarismo, kaj la rolo de la religioj en la evoluigo de pli justa kaj feliĉa mondo.

Kiel okazlokon niaj gastigantoj trafte elektis

la kviete senturistan urbeton Tábor, prenintan la nomon laŭ la Malnova Testamento, fonditan de husanoj, antaŭuloj de la eŭropa reformacio. La tiea fortikaĵo servis kiel bazejo en la sekva militado kontraŭ la katolikoj, kaj eĉ inter la husanoj mem. Kontraŭe al tiu ĉi tragike malpaca fono nia seminario konstatis - same kiel siatempe Zamenhof, kiu per sia homanarismo volis trovi komunajn valorojn en reciproka toleremo kaj estimo - ke ties partoprenantoj sentas inter si



fundamentan unuecon de celo, malantaŭ diverseco de formoj, kiuj estu fontoj por ĉies interna riĉiĝo.

La kristanan paskon ni preteratendis, sed kvazaŭ diserve ni ĉiutage ĉ. unu horon devotis: enronde ĉirkaŭ kandela lumo ni alterne legis el sanktaj skriboj, eldiris preĝojn - kaj kunsilentis. Kutime ne mankis ankaŭ specimenoj el diverskulturaj spiritaĵoj muzikkomponaĵoj kaj komuna kantado

Unu el konkretaj taskoj, solvataj en la laborgrupoj, estis i.a. la projekto de ASISTI pri okazigo de interreligia diservo/devotado komuna por la kongresanoj kaj la urbanoj kadre de la UK en Tampere en 1995.

Guinte la amikecplenan kaj inspiran etoson kaj sentante komunan bezonon kaj emon denove renkontiĝi, ni konklude ne forgesis interkonsenti, ke la seminario okazu ankaŭ venontpasse, ĉi-foje en Hungario. La organizan gvidon transprenis la tre bone konata redaktorino de E-radioelsendoj el Budapeŝto, Eva Farkas-Tatár. Ŝi apartenas al fondintoj de la tradicio de komunaj IKUE/KELI-kongresoj kaj ŝiaj spertoj, erudicio kaj homaj valoroj sendube estas garantio por sukcesa daŭrigo de la aranĝo.

Vi, kiuj ĉi-jare ne venis inter ni, estu tiam sincerkore bonvenaj!

Douglas Draper, Norvegio

### Redakciaj postnotoj:

La seminarion iniciatis ASISTI =Asocio de Studado pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj. La unuan aranĝon ĉeestis 25 homoj, kaj ŝajnas esti preskaŭ nekredeble, ke nur tri partoprenantoj el Ĉeĥa Respubliko. Dank'al sperteco de organizantoj, geedzoj Dvořák, kaj interesiĝemo de partoprenantoj la aranĝo bone sukcesis.

De la organizantoj ni ricevis por publikigo tradukon de la salutletero de d-ro Miloslav Vlk, ĉefepiskopo de Prago:

*Al la Interreligia seminario en Tábor, okazanta la 1-an ĝis 4-an de aprilo 1994.*



*Miloslav Vlk*

Praha, 5. 3. 1994

*Karaj samideanoj, mi salutas plenkore Vian internacian seminarion kiu okazas bedaŭrinde en la tagoj, por mi malpli konvenaj por povi saluti Vin persone.*

*Tial almenaŭ per ĉi tiu vojo mi deziras multe da sukceso al Via sesio kaj al tuta Via aktiveco celanta al unueco kaj kompreniĝo en la periodo, kiam en la mondo la tuta homaro estas disigita per tiom da miskompreno. Benas*

*Miloslav Vlk, ĉefepiskopo de Prago*

**Pavla Dvořáková** sendis al nia redakcio la broŝuron eldonitan por partoprenantoj de la seminario 1994 en Tábor. Sur 41 paĝoj de la kajereto (formato A5) ŝi kolektis interesajn tekstojn, citaĵojn de eminentuloj, kantojn kaj preĝojn en bonaj E-tradukoj, sperte kompilitaj laŭ elektitaj temoj el diversaj religiaj, filozofiaj k. s. verkoj.

**La temoj estas:** 1. Absoluta kaj Ĝia reflektado en la homa menso; 2. Esenco de la homo kaj ties destino; 3. Dio kaj homo - homo kaj Dio; 4. Religio kaj kredo; 5. Medito kaj preĝo; 6. Reguloj por vivi kaj kunvivi; 7. Komunikado, interkompreniĝo kaj proksimiĝado; 8. Unueco de la homaro; 9. Unueco de religioj; 10. Generala paco.

La broŝuro proponas al vi por pripensi valorajn ideojn al via intima meditado kaj preĝo. Al ĉiu meditema homo sincere rekomendinda kolekto de valoraj tekstoj kaj ideoj, simple - vera fonto de inspirado.

**La broŝuro estas havebla ĉe Pavla Dvořáková, Ostravská 637, 199 00 Praha 9 kontraŭ la supozata presoprezo 25,- Kč + 7,- Kč por sendokostoj.**

## ASISTI en 1995

Jam preparata estas la dua **Interreligia Seminario (ISE) en Hungario dum Pasko 1995**. Notu la kontaktadreson de la organizantoj:

**Eva Farkas-Tatár, Dohány 36, H-1077 Budapest, Hungario, tel.: +36-1-1422082.**

Se vi ŝatus scii iomete pli pri ASISTI, eventuale aniĝi aŭ aboni ĝian revuon "**Asistilo**", petu informojn (kaj bonvolu laŭeble ne forgesi la respondkuponon!) ĉe la adreso: **ASISTI, Blua Domo, F-09800 Arrout, Francio.**

### Akademio de Esperanto kolokvumos en Prago

Inter la 7a kaj 14a julio 1994 okazos AdE kolokvo "Pri la stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto" en Prago, hotelo TOURIST, kiun komisiite de AdE preparas eduka entrepreno de Petro Chrdle KAVA-PECH. Jam venis jenajn proponojn de la preleoj:

**Aldo de'Giorgi (I):** Esperanto: facila regula, senescepta, logika, belsona internacia lingvo, ĉu?

**Bartovská, Marie (CZ):** Teksumo kaj Esperanto

**Blanke, Detlev (D):** 1. Lingvopolitiko de la Esperanto-movado - kelkaj novaj aspektoj; 2. La rilato de Eugen Wüster al la planingvoj - kelkaj novaj aspektoj; 3. La enciklopedia vortaro Esperanto-Germana de Eugen Wüster, ĝia sorto, ties kialoj kaj ĝia eventuala perspektivo; 4. La "konkurantoj" de Esperanto - pri kelkaj aktualaj faktoj kaj tendencoj (Ido, Interligue, Interlingua, Glosa)

**Bormann, Werner (D):** Defio faklingvo

**Chrdle, Petr (CZ):** 1. Specifaj trajtoj de

sciencaj kaj teknikaj verkoj en Esperanto; 2. Bonaj kaj malbonaj spertoj de profesia uzo de Esperanto

**Eichholz, Rüdiger (CAN):** Principoj de selekto de fakaj terminoj

**Kiselman, Christer (S):** Transitiveco de la verkoj en Esperanto

**O'rgos, J. (F):** Kial, kiel translime plurnacie kunbicikli por atentokapti kaj publike funkciigi Esperanton?

**Simon, Karl-Hermann (D):** "Lexicon Silvestre" - novspeca eldono en la forstfaka literaturo

**Thierry, Jean (F):** Raymond Schwartz (1894 - 1973), la vortjonglisto

**Tyblewski, Tyburcjus (PL):** Vojaĝoj kun Esperanto

Akompanantaj personoj ĝuos riĉan kulturen kaj turisman programon, plejparte komune kun antaŭkongreso de SAT (1994-07-9/16).

Pli da informoj kaj aliĝilojn vi povas ricevi ĉe: **KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice; Tel./fakso: 02/9912126**

### Konkurso de SNEES

Por instigi pli da aŭtoroj sendi valorajn kontribuojn por la kluba bulteno SNEES (Sud-novanglia Esperanto-Societo en West Hartford, Usono), la klubo decidis aljuĝi premion por la plej bona kontribuo (artikolo, desegno, ŝerco ktp.) aperita en SNEES-bulteno dum 1994.

Partoprenu ankaŭ vi - la premio estos senpaga membreco en SNEES dum 1995. Venkinto estos proklamita en decembro 1994. La kontribuojn sendu tuj, ev. ĝis la fino de septembro 1994 al la adreso de redaktoro: **Jerry Veit, 446 S. Quaker Lane, West Hartford, CT 06110, Usono.**

## FRANTIŠEK KOŽÍK - 85 JARA

Nia ŝatata verkisto kaj honora membro de ĈEA naskiĝis 16. 5. 1909 en Uherský Brod (sudmoravia "urbo de Komenio"), abiturientiĝis en Brno (1927) kaj poste frekventis samtempe fakultatojn de juro kaj de filozofio kaj konservatorion de reĝisorado kaj dramaturgio. Kiel studento kaj poste kiel juĝeja aspiranto li jam gaste rolis en kelkaj teatroj kaj verkis libretojn por operetoj. Ekde 1933 li aktivis en Radio Brno kiel parolisto, raportisto, dramaturgo kaj eĉ dramverkisto. Tiam li ankaŭ partoprenis Esperantan elsendadon de Verda Stacio kune kun aktoroj Karel Höger, Jiří Leraus, Jarmila Kurandová. En 1941 li transiris al Radio Praha, kunlaboris ankaŭ kun filmo kaj verkis kiel profesia verkisto. Kontribuante al diversaj gazetoj li uzis pseŭdonomojn A. Adam, J. Žalman, Karel Pokorný.

Sian verkadon li komencis per poemoj kaj por radiaj dramoj, kaj daŭrigis per historiaj romanoj, precipe per biografioj de grandaj historiaj personoj. La plej grandan sukceson atingis lia romano pri la vivo de eminenta ĉeĥdevena franca mimo Johano Gasparo Debureau "La plej eminenta el Pierotoj". En aliaj libroj li priskribis la vivon de Cervantes (Kavaliro de trista figuro), de portugala poeto Camoes (La poeto ne mortas), de Komenio (Lumo en tenebroj, Anĝelo de Paco), de komponisto Leoš Janáček (Sur la herbokovrita irvoĵeto), de imperiestro Karlo IV (Kroniko de la regado de Karlo IV), de ĉeĥaj pentristoj Jaroslav Čermák (Katenoj de fideleco), Josef Mánes (Josef Mánes) kaj Zdenka Braunerová (Sur alo de ventmuelejo), de aktoro Eduard Vojan (Fanfaroj por la reĝo) kaj de verkistoj Josef Kajetán Tyl (Amato de la nacio) kaj Rudolf Těsnohlídek (Mi similas al Kristarbo).

Inter liaj historiaj romanoj elstaras "Frenezulojn nutras Dio" pri grupo de mezepokaj

aktoroj en Flandrio kaj "Super valoj mate-niĝas" pri fikcia hetmano Ŝarovec el 17-a jarcento. Al infanoj rakontas "Fabeloj de Kristnaska Sonorilo" kaj filmo "Ses ursoj kun Cibulka".

En Esperanto aperis antologieto el verkoj de František Kožík (Poeto ne mortas, Praha 1984) kaj biografio de Komenio (Lumo en tenebroj, 1992), esperantigitaj estas ankaŭ "Super valoj mate-niĝas" (tr. J. Vondroušek) kaj ĉefe "La plej eminenta el Pierotoj" (tr. J. Karen kaj J. Vondroušek). Ni tralegu fragmenton el la romano:

*Naskiĝo de Pieroto*

*La amikeco inter Teatro Funambules kaj Teatro de Akrobatoj ne plu renoviĝis. Ambaŭ direktorejoj observis sin reciproke kun suspektemo pro postkulisaj intencoj; kun envio, kiu dumtempe ŝanĝiĝis je nova malamemo. Bertrand ĉesis dueli kaj dediĉis sin senrezerve al la propra entrepreno kaj ĝia prosperigo. Tial li inklinis aŭskulti ĉiujn bonajn konsilojn kaj sugestojn, kiuj povis fari la programon de la teatro pli atraktiva.*

*"Bertrand atendas. Kion vi do volas?" bonvenigis la sekvintan tagon Felikso Gasparon.*

*"Mi volus ŝanĝi rolojn de la soldato kaj drinkulo."*

*"Kion vi volus ludi? ĉu eble princon kun gitaro?"*

*"Pieroton."*

*Poste ili estas en la direktorejo, Bertrand kun Fabien sidas en foteloj, Felikso alsidiĝis sur angulon de kesto enangule kaj Gasparo, fidante al bonaj fortoj, kiuj montriĝis en lia vivo, klarigas. Pli ol vortoj efikas liaj gestoj, lia mimiko.*

*"La ĉefa persono en ĉiu pantomimo estas Arlekeno," opinias Bertrand, sed aŭskultas atenteme. "Ni bezonas por li komikajn partnerojn."*

*"Tial mi volas prezenti Pieroton. Ankaŭ mi prikonsideris, kiel li estu vestita."*

*"Ni havas ja por li la kostumon. Tiel*

lin prezentadis Blanchard, tiel Charpigni."

"Tiu tro strikte ligita jako obstaklas dan-cadon. Charpigni portas larĝan kolumon, sed mi ne volas ĝin; ĝi kaŝas la buŝon. Kaj la buŝo devas esti videbla."

Ili aŭskultas lin duonrespekte, eble kiel azeneton, kiu ŝajnigas ĉevalon, sed samtempe kun miro, de kie aperis en li tiom da certeco. "Vi imagas lin kiel Gillo'n en la blua bluzo?" demandas Bertrand.

Gasparo fikse rigardis antaŭ sin, kvazaŭ li vidus sin mem en la nova kostumo, kaj diris preskaŭ kun pia akcento: "Mi volus havi libe-ran kitelon, bluzon kun grandaj butonoj, entute blankan. Mi volus havi larĝajn manikojn, larĝan pantalonon, ĉe ĉiu movo multajn faldetojn. Nur tiel la kostumo harmonias kun aktoro kaj spiras kun li."

"Kaj la vizaĝo restus blanka?"

"Certe. Sed surkape ĉi tiun ĉapeton."

Gasparo surkapigis la kreaĵon fare de Justina; ĝi estas nigra kun alĝustigita kov-raĵo, kiu kaŝas la hararon.

"Kaj kian ĉapelon?"

"Nenian. En pantomimo gravas ĉefe la vizaĝo, la manoj nur findiras. Observu!"

Ĉiuj devas agnoski, ke sub nigra ĉapeto blanka vizaĝo estas pli esprimiva, kaj ke peco da ŝtofo, kiu ekflirtas dum movo, vivigas personon.

"Sed ebriuo devas grimaci kaj ŝanceliĝi," ekhavis ideon Felikso. "Kaj vi aspektas malvigle."

"Jen fakto," jesas Fabien. "Li mienas kiel dum sepulto."

Afliktite li jesis, turnis sin kvazaŭ akceptante riproĉon, sed stumblis kaj ŝanceliĝis. En lia vizaĝo movis sin nek unu trajto kaj tamen ĉiuj, senvole, devis ekridi. Kaj Gasparo kun malica esprimo venke gestis: "Jen vi vidas!"

"Bone, iru!" diris Bertrand. "Provu tion! Ni ekvidos sur la scenejo!" Kaj kiam post Gasparo kaj Felikso fermiĝis la pordo, li turnis sin al Fabien: "Se mi ne eraras, kara kolego, aperos sur nia scenejo entute nova persono."

## INTERPAROLO KUN ESTRO DE URBA MUZEO EN ĈESKÁ TŘEBOVÁ

En urba muzeo en Ĉeská Třebová mi renkontiĝis kun multjara esperantisto, kunfondinto de la loka E-klubo en 1960, kun s-ro Jiří Pištora. Jam naŭ jarojn li laboras en la muzeo kaj pasintjare li fondis ĝian E-parton.

**Kiam vi cerbumis pri fondo de E-muzeo?**  
Mi ĉiam klopodis propagandi la E-ideon kaj disvolvigis Esperanton diversflanke. Pri fondo de E-parto mi cerbumis jam en 1985, sed malfavoraj kondiĉoj ne permesis al mi fari tion.

**Kio instigis vin al realigo de via ideo?**

Nia urba muzeo starigis du taskojn. Precipe kolekti historiaĵojn de Ĉeská Třebová kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo. Plue kolekti historiaĵojn de fervojo en orienta parto de Bohemio. Politikaj kaj multaj aliaj ŝanĝoj en la loka industrio liberigis spacon por akcepti aliajn kolektojn. Mi kaptis okazon, kaj dank'al la urba konsilantaro mi fondis ankaŭ E-parton de la muzeo. La plej gravan celon de fondigo mi vidis en ŝirmado de E-historiaĵoj el Bohemio, Moravio kaj Silezio, ĉar kelkaj E-kluboj perdas klubejojn en kulturaj organizaĵoj forjetante esperantaĵojn kaj perdigante ilin por ĉiam.

**Kia eĥo sekvis post la informo inter esperantistoj?**

Multajn bondezirkartojn mi ricevis el la tuta mondo, kaj mi tre dankemas al ĉiuj, kiuj morale subtenis min. En nia lando nur kelkaj unuopaj esperantistoj grumblis aŭ "ŝovis la kapon en sablon" dubante pri sukceso. Tre realisme akceptis la fondon la EA-komitato, kun kiu mi subskribis kontrakton. Ĝi enhavas interkonsenton pri kunlaboro, subteno kaj eventuala likvido de E-parto de la muzeo. Se oni likvidos la muzeon, ĉion el la E-parto ricevos senpage EA.

### Ĉu helpas vin la loka esperantistaro?

Laŭ sia libera tempo alvenas en la muzeon sperta esperantisto Jan Kovář, kiu plenumas "formikan" laboron. Li devas ĉiujn sendaĵojn akcepti, dividi, trastudi, kaj poste ni komune decidis, ĉu ni envicigos esperantaĵon en la kolekton.

### Kion vi jam ricevis por la muzeo?

Tre interesajn, utilajn kaj valorajn esperantaĵojn ni ricevis de Vl. Blažek el Olomouc, de s-ro Hofman el Plzeň, de Jarmila Rýznarová el Pardubice, plue el Přerov, Ostrava-Poruba, Ostrava-Haviřov, Opava, Náchod, Česká Třebová. Valoran bibliotekon donadis al la muzeo s-ino M. Bartošíková el Praha, alian IFEF-sekcio laŭ konsento de eksposedanto ing. Řebiček el Havlíčkův Brod. Raraĵo estas la kroniko de eksklubo en Nový Bydžov. Ankaŭ aliaj kluboj kaj unuopuloj proponis al la muzeo donacojn, sed bonvolu atendi, ĉar nia tempo por transpreni esperantaĵojn estas limigita.

### Kion vi preferas ricevi por la muzeo?

Ĉion, kio rilatas al la historio de Esperanto en nia lando kaj ankaŭ al la nuntempo, ĉar ni ne forgesu, ke ĝi post kelkaj jaroj fariĝos serĉata historio. Do: insignojn, poŝtmarkojn, interesajn leterojn, lernolibrojn, vortarojn, librojn, ĉiujn esperantaĵojn kun e-signojn ktp.

### Kiel vi vidas la estontecon de la urba muzeo kaj de ĝia E-parto?

Nia muzeo nun posedas komfortan, elektroteknike protektatan, ĉiuflanke konvenan deponejon. En ĝi ni akumulas muzeajn kolektojn inkluzive de la Esperantaj. Pacience ni atendas finrekonstruon de domo, kie ni povos prezenti la muzeajn kolektojn al la publiko. Kaj kion diri fine? Kiel firme ni kredos al la ideo de Esperanto, tiel firme ni kredos pri estonteco de la E-parto de nia muzeo, kompreneble kun subteno de la esperantistaro.

Intervjuis: Jana Křížková

## PARADIZO POR TURISTOJ KAJ NATURAMIKOJ


En la pitoreska regiono de Vrátná Valo kun riĉaj akvofaloj, profundaj kanjonoj, rara flaŭro kaj faŭno kiel ankaŭ en la regiono de Súlov-rokaro okazos en la tagoj 31. 7. - 6. 8. 1994

### la 16-aj Turismaj Tagoj (TUTA '94).

Por partoprenantoj estas preparataj turismaj ekskursoj en grupoj A, B, C, tuttaga busa ekskurso, riĉaj vesperaj programoj.

La partoprenkotizo enhavas tranoktadon, ekskursojn, vesperajn programojn kaj organizajn elspezojn. Vi povas elekti aŭ hotelan ĉambron kun banĉambro aŭ studentan hejmon kun komunaj duŝoj. Pagu en germanaj markoj (DM) aŭ en slovakiaj kronoj laŭ valida kurso.

Aliĝilojn kaj informojn petu ĉe: **E-klubo, Box B - 152, 012 41 Žilina, Slovakio.**



**Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1**

**☆ STARTO ☆**

**Periodikum Českého esperantského svazu  
Vychází 6x ročně a je určeno členům svazu.**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno**

**Administrátor: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2**

**Evidence a změny adres: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha**

---

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare.**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio.**

**Abonprezo: 15 gld.**

**Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno**

**Administrato: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2**

**Ĉeĥa Respubliko**

---

**Podávání listovních zásilek povoleno  
JmŘS Brno, č. j. P/3-8847/91 ze dne 28. 8. 1991**

**NOVINOVÁ ZÁSILKA**

**Poštovné hrazeno u pošty  
664 03 Podolí u Brna**